



Turlanda Esperanta Kulturcentro
Domo de Asocioj
Gaston Pailhou Placo
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

Enhavtabelo	Paĝoj	Kate Sheppard
La franca kanalo Arte prezentis elsendon pri Kate Sheppard, reĝisoritan de Corinne Sullivan. Jen la traduko de Gérard kaj Jeannine, en kiu ni malkovras la batalon de Kate por havigi la voĉdonrajton al virinoj de Nov-Zelando.	1 2 3 4	« Ĉu estas justa, ke oni povas fidi al klera virino por instrui en lernejo sed, ke oni ne povas fidi al ŝi por voĉdono, kiu estas donita al la knaboj, kiujn ŝi edukis antaŭ ol ili havas ŝian aĝon aŭ ŝiajn sciojn. » Tiuj vortoj estas tiuj de Kate Sheppard, la instiganto de virina movado, kiu transformos Nov- Zelandon kaj faros ĝin la unua lando en la mondo, kiu atribuos la voĉdonrajton al la virinoj en 1893, pli ol 50 jarojn antaŭ Francio kaj 25 jarojn antaŭ Germanio.
Jane forpasis en aprilo 2021. Kelkaj membroj de nia klubo ĉeestis la funebran ceremonion, kiu okazis en la tombejo de ŝia kara urbo Vouvray. Hélène Alessandri parolas pri siaj memoraĵoj kun Jane, kiuj iom post iom kondukis al firma amikeco.	4 5	Forlasante Eŭropon, tiuj pioniroj, kiel Kate Sheppard, lasas malantaŭ si tion kion ili nomas la malnova obskura mondo. Je la antipodo ili trovas novan teron, kie la reguloj estas reskribotaj kaj, en la fondiĝo de tiu nova socio, la virinoj estas tre decidaj ludi la ĉefan rolon. « Ĉu estas justa, ke la pigrulo, la monludanto, la drinkulo aŭ eĉ la viro, kiu batas sian edzinon havas la rajton voĉdoni, dum la honestaj virinoj, edukitaj kaj delikataj estas senigitaj je tiu rajto »?
Ĉu nia kunvivanto iam estos humanoido ? Tio estas la temo de la novelo "Fatala virino" el la retejo "short-edition.com" tradukita de Jean-Mary, kiu ankaŭ prezentas humanoidojn, kiuj reale ekzistas.	5 6 7	Sub la influo de Kate Sheppard, la urbo Christchurch, situanta sudoriente de Nov- Zelando inter la ebenaĵoj de Canterbury kaj la Pacifiko, iĝas antaŭtempe la centrejo de la batalo de la sufragetoj. Oni kromnomas Christchurch-n la urbo de ĝardenoj ; ĝi havas la ĉarmon de kvietra urbo, sed ĝi estas priskribita tiam kiel la ĝoja ĉastereno de la ekstravaganculoj kaj la naskiĝloko de ĉiuj novaj kaj strangaj ideoj. Eĉ en tiu nova mondo, la virina batalo estas ankoraŭ tute ne gajnita.
Recepto de semifreddo de Gérard kaj Jeannine	8	

La domo de Kate Sheppard iĝas la epicentro de feminisma movado, la loko, kie la ideoj formiĝas kaj la agoj estas planizitaj. Jen la domo, la loko, punkto nulo, kiel oni povus nomi ĝin. Estas ĉi tie, kie Kate Sheppard laboris. Estas ĉi tie, kie ŝi skribis siajn paroladojn, estas ĉi tie, kien ŝiaj amikinoj venis vidi ŝin kaj kie ili pripensis la manieron sukcesi, kiamaniere direkti sian kampanjon. La ideo, la batalo estas, ke ĉiuj virinoj, kiaj ajn estas ties origino aŭ socia klaso, obtenas la voĉdonrajton ; kvankam la movado estis gvidita de blankaj virinoj el la mezklaso, ni scias, ke ili volas, ke ĉiuj estu inkluditaj ; la virinoj ne havis influon ekster la hejmo, sed ilia rolo estis valorigita ; la virinoj estis rigarditaj kiel, pli kaj pli gravaj, pro sia patrino rolo, kaj estas en tiu patrino rolo, ke ili antaŭeniris.



Kate Sheppard

Multaj virinoj kuniĝas al la batalo de Kate Sheppard. Ili skribas leterojn, peticias, faras paroladojn, sed la ĉefelementa faktoro de la sukceso de Kate Sheppard estas la vira subteno en la Parlamento.

Ili trovas apogon de konservativuloj, kiuj vidas la virinojn kiel agentojn de civilizado, pretajn atenti la moralecon, en lando de pioniroj, kie la viroj estas supernombraj. Multaj forlasis sian familion por alveni solaj, enŝipigitaj sur balenŝipoj aŭ por serĉi oron.

Donacante la voĉdonrajton al la virinoj, la konservativuloj pensas plifortigi la influon de la familia viro kontraŭ tiu de la pigra fraŭlo. Sen la

subteno de la viroj, nenio okazintus. Vere estis kunlaboro inter viroj kaj virinoj. Ili alportis sian ekspertizon kaj partoprenis en la movadon. Sed estas la virinoj, kiuj faris la tutan laboron, ne ĉion sed la plejmulton de agitado kaj de la organizo por obteni petskribojn:

Kvarono de la Nov-Zelandanoj, ĉefe en la suda insulo, subskribis la peticion kaj la leĝo estis adoptita en 1893 de tre malmulte. Sed antaŭ ol alveni al tiu venko, la virinoj batalis preskaŭ dum unu jardeko.

Kiam oni konscias, ke la landa popolo estas dismetita sur pli da 1700 km da longeco kaj ke la etaj komunumoj estas disigitaj per maroj, arbaroj, riveroj, montaroj, oni ekkomprenas la amplekson de la laboro por la kolekto de subskriboj, kiujn la virinoj obtenis unu post la alia, irante pord-al-porde.

En Christchurch, nur malmulte da videblaj spuroj de tiu lukto restas. La teatroj kaj la preĝejoj, kie la virinoj retroviĝis estis detruitaj per la seismoj de 2010 kaj de 2011. Sed centre de la urbo, laŭ la rivbordo de la rivero Axon, memormonumento estas starigita por laŭdi la lukton de Nov-Zelandanoj. La virinoj sur la memormonumento Kate Sheppard bildigas la diversecon de la partoprenantoj al la kampanjo por la voĉdono.

Ĉiu virino povas veni al tiu memormonumento kaj trovi iun, kiu similas al ŝi, ĉu junulino aŭ maljunulino, ĉu ĉeheimma virino, ĉu profesiulino, ĉu virino el la laborista klaso, aŭ ankoraŭ Maoriino aŭ Eŭropanino.

Vi havas pikturajn panelojn, kiuj montras la laboron kaj la vivon de la virinoj tiuepoke ; unu el ili havas duoblan funkcion : ĝi prezentas la ĉeheimman virinon kaj vi povas vidi fone virojn sidantajn ĉirkaŭ tablo ; la vorto « biero » indikas, ke la loko estas trinkejo. Tiuj viroj havas la dorson turnitan al siaj familiaj respondecoj.

Estis la situacio en Nov-Zelando kaj tio alkondukis multajn virinojn, maltrankviliĝi pro tio, ke la viroj tro trinkis kaj ne povis pagi la luprezon aŭ aĉeti nutraĵon por la familio. La virinoj vidas la alkoolon kiel gravan plagon kaj ili organiziĝas sub la kristana Unio de modereco de virinoj, kiu rekomendas virtajn morojn kaj la alkoolan prohibicion. Tiu Unio starigis fakon por gajni la voĉdonrajton, kaj Kate Sheppard fariĝis la estro de tiu fako. Per ŝia laboro, kaj instigo al la anoj, tiu Unio iĝis la plej granda organizanta bazo de la virina politikagado.

La alkoola industrio, kiu timas, ke la virinoj amase voĉdonas por la prohibicio, trudinfluas la deputitojn kaj iĝas unu el la ĉefaj kritikantoj de la sufrageta movado, sed la virinoj gajnos la batalon. La 28an de novembro 1893, ili iras al la urnoj kaj estas sukceso ; 82% de enskribitaj virinoj iras voĉdoni.

Kiam la leĝa projekto, kiu donas la voĉdonrajton al la virinoj, pasas en la Parlamento, la kamelioj floras. La partizanoj decidis donaci blankajn kameliojn al la parlamentanoj, kiuj subtenas la leĝan projekton. Alia grupo, kiu kontrauis voĉdonadon por virinoj donacis ruĝajn kameliojn al la membroj de la Parlamento, kiuj estis kontraŭ la virina voĉdonrajto.

Se Nov-Zelando obtenas tuj la virinan voĉdononrajton, estas ankaŭ dank'al la enkonduko de la egaleco en la edukada sistemo. Konstruita en 1873, la Canterbury kolegio estas la dua universitato kreita en Nov-Zelando laŭ la angla modelo de Oxford kaj de Cambridge ; sed en granda diferenco de la britaj universitatoj, la virinoj povas studi en ĝi ekde ĝia kreado. Helen Connon de Christchurch estas la unua virino el la brita imperio diplomita en universitato en 1881. La ejo de la antaŭa Canterbury Universitato estas nun la Christchurch Art Centre.

La edukado estas faceto gravega, mi pensas, por la virinoj tiuepoke, por ilia promocio, por havi pli da libereco kaj da sendependeco en la privata vivo. Mi pensas, ke sen tiu klasa strukturo, malpli rigida en Nov-Zelando, kompare kun tiu de Anglio, la Nov-Zelandaj virinoj estis kuraĝigitaj esti pli memstaraj en siaj pensoj kaj pli decidemaj por si mem kaj por siaj infanoj.

Kvankam la universitatoj akceptas la virinojn, ĉiuj diskriminaciaj formoj ne estis delasitaj. Konvencie, la virinoj devas sidi antaŭ la viroj. Krome la pufaj kulotoj kaj jupkulotoj ebligantaj pli grandan liberecon de movado estas absolute malpermesitaj en la universitato.

Mi pensas, ke la nuntempaj virinoj ne vere konscias, kion tiuj virinoj tiam eltenis por havi la rajtojn kaj la privilegiojn, kiujn ni havas hodiaŭ. Eĉ etaj aĝoj, kiel la maniero vesti sin. La simpla fakto surmeti tiun kostumon, konsciigis min pri la graveco de la devigoj en la maniero vesti sin kaj kiel tio limigis ilin.

Multe el ili ofte havis ĝis 14 infanojn, kiujn ili devis eduki sole, se la edzo forlasis ilin. Ili havis neniun rimedon por finance subteni ilin, nur farante subalternajn laborojn por malmultege da mono. Tiuj

aĝoj igis la virinajn vivojn tre malfacilaj en malnovaj tempoj.

La heredaĵo de Kate Sheppard kaj de tiuj, kiuj batalis kun ŝi por obteni la voĉdonrajton estas fenomenaj kaj ŝanĝis la fluon de la eventoj.

Fine de la 19a jarcento, la ĵurnaloj parolas pri la biciklantinoj pioniraj de Christchurch. La biciklado estas kunligita al la virina lukto kaj iĝas la simbolo kaj la vehiklo de nova libereco. Veturi bicikle faciligas la societemon kaj kondukas la virinojn en la publikan spacon laŭ nova kaj videbla maniero ; pli ol ĉiu alia invento, la biciklo estas tiu, kiu donas sendependencon al la virinoj. Per biciklo, ili povis vojaĝi sur pli grandajn distancojn. Ili povis trejnadi laŭ sociala, konvena maniero, eĉ se ĉiam estas personoj por kontraŭstari tion. La biciklo estas ankaŭ praktikega por moviĝi kaj subskribigi la peticion al la virinoj.

La pejzaĝo, kiun vi povas vidi malantaŭ mi, estas la urbo Christchurch kaj la ebenaĵoj de Canterbury kaj aliflanke de la monteto en kontraŭa direkto troviĝas la malgranda urbo Lyttelton. Lyttelton estas la loko, kie alvenis la unuaj kolonianoj per siaj boatoj kaj dum kelkaj jaroj, ĝi estis la ĉefa centro de tiu regiono. Lyttelton estas ankaŭ grava ĉar la unua virino elektita en la Nov-Zelanda Parlamento, Elisabeth McCombs, devenis el tiu loko.



Elisabeth McCombs



Jacinda Adern

Mi memoras, ke Kate Sheppard diris, ke ŝi sentis sin tre bonŝanca vidinte la virinojn obteni ne nur la voĉdonrajton dum sia vivo sed ankaŭ vidinte la unuan virinon elektitan en la Parlamento.

Necesos ankoraŭ 26 jaroj da lukto inter la momento, kiam la virinoj obtenis la rajton voĉdoni kaj tiu, kiam ili povis esti elektitaj kaj kunsidi en la registaro.

Hodiaŭ, Nov-Zelando estas konata por havi unu el la plej virinajn registarojn el la planedo. Jacinda Adern estas la tria virino elektita kiel landestrino. Ŝi estas unusola el la virinoj iĝi patrino, estante samtempe estrino de la registaro. La bildo de la ĉefministro kun ŝia bebo en la ONU faris la mondan rondiron. « Mia espero estas, ke knabinetoj kaj junaj virinoj estu, kiuj ili volas esti, la partiestrino, kiu ili volas esti en tiu loko, kaj se ili deziras, ili povas ankaŭ esti patrino, bona zorgantino, bona partnerino, bona fratino, bona onklino, bona aktivulino ; kaj se ili deziras, la knaboj povas eventuale esti ankaŭ ĉefministro ».

Sinjoro la Prezidento, jen kion mi esperas por la onta generacio de virinoj.

Mi omaĝas al tiuj, kiuj nin antaŭis.

Mi pensas, ke nia lando havas la respondecon daŭrigi la progreson kaj montri la vojon pri la temoj ligitaj al la virinoj, ĉar ni havis tiun rolon en la Historio kaj tio devus aparteni al nia nuntempo kaj al nia futuro.

Tiun artikolon proponis Gérard kaj Jeannine.

JANE

Mi ekkonis Jane en la jaro 2011, kiam mi aliĝis al la Esperanto-grupo en Tours kaj komencis sekvi kun ŝi la lecionojn de Jean-Mary sed ni vere amikiĝis dum la somero 2012, kiam ni partoprenis esperantan renkonton de Pluezeko.

Ni kunveturis kaj, dum la vojaĝo, ni multe babilis, parolante pri niaj interesaĵoj. Interalie, ni ambaŭ ŝatis danci popolajn dancojn – alian fojon, mi eĉ kondukis ŝin al popolbalo. Jane ankaŭ rakontis al mi sian infanecon en la kamparo (sia kara valo de Cousse) dum la dua tutmonda milito. Semajnfine, antaŭ ol hejmeniri, ni vizitis studamikinon de Jane, kiu loĝis en emeritdomo kaj ŝajnis multe pli maljuna ol ŝi.

Fakte, Jane mirigis min dum la grupvojaĝo en Rumanio je la somero 2013. Ŝi piediris, supreniris la ŝtuparojn de kasteloj kaj montetoj kiel ŝi havis dudekjarajn gambojn malgraŭ ke ŝi devis esti operaciota je la kokso, kiam ŝi revenos hejmen.

Tio, kion mi ankaŭ admiris ĉe Jane, estis ŝia kapableco konservi scivolemon kiel la infanoj. Foje, mi inicis ŝin pri geokaŝado (vidu kio ĝi estas tie - esperante - <https://eo.wikipedia.org/wiki/Geokaŝado> aŭ tie - france - <https://fr.wikipedia.org/wiki/Geocaching>). Ni serĉis - kaj trovis - tri aŭ kvar kaŝujojn proksime de Marmoutier sub pluvego. Mi revidas nin pli kaj pli malsekajn malgraŭ la pluvombreloj sed ĉiam ridantajn ! Jane trovis mirinda tiun ludon ĉar ĝi estas miksaĵo de malnova ludo kaj tre novaj iloj kaj ĝi kunigas milojn da ludantoj tra la tuta mondo.

Mi havas multajn aliajn memoraĵojn pri Jane kaj tio, kion ni faris kune :



spektaklo de baroka teatro, koncertoj de la grupo Mundovox, ktp ... kaj, kompreneble, multaj esperantaj eventoj.

Finfine, ŝajnas al mi ke la antaŭnomo « Jane » - tiel skribita - resumis ŝian personecon : enradikiĝinta en la pasinta tempo sed originala kaj moderna.

Jane, vi donis al mi tiom da bonaj tempoj kaj aĝoj ke mi ŝatus aspekti kiel vi, kiam mi baldaŭ maljuniĝos ...

Teksto skribita de Hélène Alessandri omaĝe al nia amikino Jane

Fatala virino

De Marc de Armont

Paŭlo malfermis la okulojn kaj etendis sin.. Li rigardis la horon ciferece montratan sur la plafono super la lito : 6:52. Kiel ĉiam li vekiĝis antaŭ la planita horo.

Li turnis sin al Aleksandra, kiu havis la taskon veki lin je la sepa, kaj rigardis ŝin dormi. Ŝia brusto leviĝis laŭ la ritmo de ŝia regula spirado.

Kompreneble ŝi ne vere dormis kaj krome ankaŭ ne spiris. Sed Paŭlo en tiu momento tute ne zorgis pri tiuj filozofiaj digresioj.

La tagiĝo enŝoviĝis tra la vitrajn aperturojn, ĵetis sian palegan lumon en la ĉambron kaj koncentriĝis sur la vizaĝo de Aleksandra.

Li detalis la harojn akvofale falantajn sur la kapkusenon, la fermitajn palpebrojn kun longaj kurbigitaj okulharoj, la perfekte desegnitajn nazon kaj la iomete malfermitajn lipojn.

Hodiaŭ, li pensis, la droidaj virinoj havas surprizan realismon kaj ilia simileco kun la homaj estas preskaŭ perfekta.

7:00. Aleksandra ĵus malfermis la okulojn.

— Paŭlo, kara mia, nun estas la horo, ŝi diris kun apenaŭ perceptebla metala tono en la voĉo.

Ŝi alpremiĝis al li kaj surmetis la lipojn sur liajn. La kontakto kun ŝia korpo vekis en li ekdeziron kaj li tuj bedaŭris, ke hodiaŭ matene li ne programis ŝin en "karesema" reĝimo. Necesas diri ke la rezultoj atingitaj de la fabrikantoj koncerne teksturon kaj elastecon de la artefarita haŭto estas mirindegaj. « Sensaĵoj pli veraj ol la naturaj », diris la reklamo. Bedaŭrinde li devis imperative esti en la laborejo je la naŭa. Do li ne retenis ŝin kaj penis elpeli el sia menso ĉian ideon pri sekso.

Post kvar jaroj da komuna vivo kun Laŭra kaj la peniga disiĝo kiu sekvis, li ne plu havis la deziron

provi denove. Krome pro la ĉieesteco de la ciferecaĵo, la homaj rilatoj radikale modifiĝis. Ĉiuj aktivaĵoj povis nun plenumiĝi el hejme per intermetita ekrano, inkluzive de la liberaj okupoj. Konsekvence homoj ne plu eliris, ne plu renkontiĝis, kaj la nombro de fraŭloj senĉese kreskis. Hom-oidaj robotoj estis jam multaj en la socio kaj ofte anstataŭis homon por la penigaj kaj danĝeraj laboroj. Tial Paŭlo ne hezitis kiam la unuaj ekzempleroj de droidoj por kompanio estis surmerkigitaj antaŭ ses monatoj.

Aleksandra jam sidis sur la rando de la lito kaj skuis sian hararon, kun la kapo inklinita antaŭen, el kio rezultis la malkaŝo de la identigstrikodo tatuata sur ŝia nuko. Paŭlo trovis en tio nekontesteble seksallogan flankon.

Sed ŝi jam iris al sia banĉambro, reale la ĉambro entenanta la ilaron necesan por la funkciado. La tuta operacio estis aŭtomatigita kaj Paŭlo neniam eniris tien.

Li apenaŭ havis la tempon admiru ŝian manieron paŝi koksolulante kaj ŝian korpon ondiĝantan sub la travidebleco de la noktovesto. Ŝi turnis sin al li kaj ridetis antaŭ ol malaperi malantaŭ la pordo.

Paŭlo leviĝis siavice, kiam lia tabulkomputilo pepis. La konektata tabulkomputilo ebligis kontroli ĉiujn aparatojn en la domo, inkluzive de Aleksandra.

Sciigaĵo signalis mesaĝon de la Droidapp aplikaĵo : "Ĝisdatigo de via droido estas disponebla, ĉu vi volas instali ĝin ?". Li kutime plenumis la ĝisdatigojn sen prokrasto, por profiti plej rapide la lastajn novaĵojn. Li premis "Ĝisdatigu" kaj iris preni sian duŝon kaj vesti sin.

Duonhoron poste Paŭlo pasis en la kuirejon malfermiĝantan al la salono. Instalita antaŭ la centra insulo sur unu el la altaj taburetoj, li mendis laŭtvoĉe longan kafon sen sukero. La trinkaĵomaŝino ekfunkciis kaj unu minuton poste li trinkgustumis sian kafon maĉante stangon de korna buterbulo.

Nutraĵo preskaŭ ne plu ekzistis en sia origina formo sed prezentiĝis en la formo de aromigitaj stangoj, kiuj havis la saman nutran valoron kiel la elektitaj ingrediencoj kaj donis la saman guston.

Manĝante li foliumis la ciferecajn paĝojn de la lasta numero de *DroidoMagazino* sur sia tabulkomputilo. Tripaĝa artikolo estis dediĉita al la venonta surmerkato de viraj droidoj por kompanio, por respondi al la forta peto en tiu kampo.

La eniro de Aleksandra en la salonon levigis al li la kapon. Perfekte ŝminkite ŝi havis surkape malordigitan hartuberon, kies hartufetoj falis sur la vizaĝon. Ŝi estis vestita per malgranda ruĝa robo

kun maldikaj ŝelkoj, kiu valorigis ŝian perfektan korpon. Paŭlo trovis ŝin pli bela ol neniam. Ŝi sidiĝis sur la kanapon por spekti la informojn sur la murekrano. Koncipita por reprodukti la sintenojn de la homoj, ŝi ŝajnis sorbita de raportaĵo pri la ĉeesto de pingvenoj sur la plaĝoj de Normandio, kaŭzita de la klimata malreguliĝo.

Paŭlo iris sidiĝi apud ŝin kaj metis brakon ĉirkaŭ ŝiajn ŝultrojn. Ŝi havis tiam nekutiman reagon. Liberigante sin per abrupta gesto ŝi kraĉis en agresema tono :

— Ne tuŝu min !

Ŝi havis malmolan rigardon kaj fermitan vizaĝon. Paul neniam vidis ŝin tia.

— Vi estas bela kiam vi koleras, li aŭdacis diri karesante al ŝi la antaŭbrakon.

Tiufoje ŝi forpuŝis lin perforte, forpelante lin ĝis la ekstremaĵo de la kanapo per neatendita forto.

Mirfrapite Paul leviĝis kaj kontrolis la agordon de la tabulkompufono. Li ne programis la reĝimon "disputo". Cetere li neniam uzis ĝin. Li testis ĝin nur unufoje kaj ĝi ne ŝajnis al li tiom perforta.

Aleksandra nun staris, dorsapogate al la centra insulo de la kuirejo. Kun la krucitaj brakoj ŝi daŭre rigardis lin kaj ne ŝajnis en pli bona humoro. Paŭlo decidis tiam senaktivigi ŝin portempe. Kiam li premis "Dormeta reĝimo", la programaro respondis "Nevalida funkcio". Li ripetis plurfoje la operacion sen sukceso. Pli kaj pli maltrankvila li provis la funkcion "Malkonekti" sed ricevis la saman mesaĝon : "Nevalida funkcio". Tiam li memoris, ke la malkonekto povas ankaŭ plenumiĝi per movo de ŝaltilo lokita sub la strikodo de la droido, samnivele kun la nuko. Maltrankvila li proksimiĝis al Aleksandra.

— Ĉu ni paciĝu unu kun la alia, konsentite ?

Li venis pli proksime kaj malrapide levis la manon ĝis tuŝeto de ŝia ŝultro.

— Mi avertis vin !

Ŝi pugnobatis al li la stomakon, kio rezultigis senspirigon. Kurbiĝinte li ne vidis veni la duan baton kiu trafis lin sur la vizaĝo kaj faligis lin surplanken. Tiam okazis torento da perforto. Ŝi batis senemocie, metode, per pugnobatoj, per piedbatoj. Paŭlo, nekredema, ne komprenis tion, kio okazis. Li abunde sangis, lia nazo estis rompita kaj lia lipo krevinta. Li provis protekti sin per la brakoj. En la daŭro de unu sekundo li duonvidis la vizaĝon de Aleksandra. Ĝi estis senesprima, flegma. Li komprenis tiam, ke li devos savi sian vivon.

Li rifuĝis momenton sub la tablon. Ŝi renversis ĝin tuj. Li prenis seĝon kaj ĵetis ĝin sur ŝin per sia tuta forto. Ŝi apenaŭ ŝanceliĝis kaj denove ekbatis. Venante malantaŭ lin, ŝi kaptis al li brakon, kiun ŝi refaldis perforte en lia dorso. Paŭlo aŭdis la krakon

de la artiklo, kiu cedis sub la torsio. Li kriegis pro la doloro.

Nun genuante malantaŭ li, ŝi relevis lian kapon kaj entreprenis strangoli lin per brakblokada. Post kelkaj sekundoj, li eksufokis. Poste li sentis ĉiujn siajn fortojn forlasi lin. Liaj okuloj malklariĝis. Li ne aŭdis la tabulkomputilon tinti, kiu indikis la alvenon de mesaĝo, kiun li neniam legos. Li faris la lastan spiron en la tempo, kiam la Droidapp mesaĝo videbliĝis :

« **ATENTU : GRAVA MESAĜO.** La lastan ricevitan ĝisdatigon vi devas tute ne apliki. Ĝi estis sendita al vi pro eraro kaj estas destinata al la sistemo ekipanta la droidojn de la Specialaj Trupunuoj por la ordoteno. Se vi jam aplikis tiun ĝisdatigon, vi devas tuj kontakti nian teknikan servon ».

Tiun novelon proponis Jean-Mary.

Sed se vi kredas ke vi legis fikcion, vi grave eraras ; vidu sube kelkajn ekzemplojn de humanoidojn.

Replikoj de Dr Ishiguro

D-ro Ishiguro de Osaka Universitato ne estas fremda al ultrarealismaj humanoidaj robotoj. Li ankaŭ estas la estro de la Inteligenta Robotiko-Laboratorio kaj estas rekonita en la scienca komunumo por sia kapablo rekrei emociojn sur la vizaĝoj de siaj robotoj. Li kreis la perfektan kopion de si mem en robotversio, Germinoid HI-1, same kiel la humanoidan aspektaĵon de sia propra filino kiun li nomis Repliee R1.



Filino de Dr Ishigushi kaj ties repliko

Jia Jia

Ĉi tiu roboto en formo de virino vestita per tradicia ĉina kostumo kaj evoluinta en tiu lando kapablas teni fluidan konversacion kun homoj, krom montri

emociojn, palpebrumi kaj eĉ rideti. Lastatempe, Jia Jia fariĝis unu el la unuaj humanoidaj ciborgoj intervjuitaj de ĵurnalisto en reala tempo.



Jia Jia

Otonaroid kaj Kodomoroid

Tiuj du robotoj laboras de pluraj jaroj kiel akceptistoj ĉe la Muzeo de Scienco kaj Novigado en Tokio, Japanio, kie ili interagas kun vizitantoj ĉiutage. Otonaroid ŝajnas esti la akceptisto de la muzeo, kapabla konversacii kun homoj. Kodomoroid, kun mallonga hararo, estas desegnita por ludi la rolon de scienca raportisto.



Otonaroid kaj Kodomoroid

Actroid

Actroid estas humanoida roboto kun forta homa vida aspekto. Ĝi estis evoluigita fare de la Universitato de Osako, Japanio. Ĉi tiu ciborgo unue estis lanĉita en 2003 kaj ekde tiam malsamaj versioj estis faritaj. Ŝi ŝajnas esti juna virino de japana deveno kaj povas funkcii aŭtonome, parolante kaj gestante interagante kun homoj.



Actroid

Sophia

Sophia estas humanoida roboto formita laŭ aktorino Audrey Hepburn kaj evoluigita fare de la Hanson Robotics firmao, kiu en oktobro 2017 iĝis saŭdi-arabia civitano. Ĝi iĝis la unua ciborgo se temas pri ricevi civitanecon de lando. Sophia estis dezajnita por lerni kaj adapti homan konduton. Kapablas imiti gestojn kaj mimikojn kaj respondi iujn demandojn.



Sophia

Klarigoj : "CIBORGO" estas CIBernetika ORGANismo.

Oranĝparfumita semifreddo

Tiu escepta itala deserto anstataŭas glaciaĵon fine de la manĝo. Freŝa kaj parfumita, ĝi gajnas ĉiujn voĉdonojn.

Por 6 personoj

Preparado : 30 mn

Kuirado : 30 mn

Atendo : 4h 30

Ingrediencoj

2 oranĝoj
3 ovoj
100 g da sukero + 1 supkulero
90 g da faruno
1 kafkulero da maizeno
2 supkuleraj da oranĝa likvoro
50 g da nigra aŭ lakta ĉokolado

Por la garnaĵo

300 g da « ricotta » (itala fromaĝo), da « brousse » aŭ da Sankta Florentino.
15 cl da likva kremo
20 g da sukero
50 g da konfititaj fruktoj kube pecigitaj
30 g da senŝeligitaj pistakoj
2 supkuleraj da pecoj da ĉokolado
1 supkulero da oranĝa likvoro

Konsiloj

Por sukcese prepari la savojkukon, regule bati la ovojn skrapante la bovlobordojn kaj zorgu, ke la kuirbano ne bolu.

La ovoj kuirbane batitaj estas sufiĉe varmaj, kiam oni povas en ĝi trempi la fingropinton sen brulvundi sin. Se vi preferas uzi kuirejan termometron, la ĝusta temperaturo estas 40°C.

Unua etapo

Tegu la muldilon per sulfatizita papero. Antaŭhejti la bakfornon je 180°C (th 6). Rompu la ovojn en bovlon kun 100 g da sukero kaj batu. Loku la bolvon en kuirbanon sur milda fajro kaj regule batu. Kiam la miksaĵo estas varma, eltiru de la fajro kaj daŭrigu bati ĝis ĝi fluas kiel rubando. Aldonu la farunon miksitan al la raspita oranĝŝelo. Verŝu la paston en muldilon. Forne kuiru 25 min.

Dua etapo

Elmuldigi la savojkukon sur kradon kaj lasu ĝin

malvarmiĝi

Per senŝeligilo elpreni la ŝelon de alia oranĝo kaj distranĉi ĝin en bastonetojn. Ankoraŭ per senŝeligilo distranĉi la ĉokoladon en rubandetojn. Tranĉu la savojkukon en 3 bendojn. Prilaboru la « ricotta-n » kun la sukero kaj unu supkulero da oranĝlikvoro. Aldonu la konfititajn fruktojn, la hakitajn pistakojn, la ĉokoladpecetojn. Kirlu la kremon en ŝaŭmkremon kaj aldonu ĝin al la preparaĵo.

Tria etapo

Tegu rektangulon muldilon per plasta filmo, lasante ĝin superiri. Loku funde de la muldilo unu savojkukan bendon. Ŝmiru ĝin per la duono de la kremo. Rekovri per dua savojkuka bendo. Ŝmiru per la krema restaĵo. Finu per la lasta bendo de savojkuko. Refaldi parton de la plasta filmo por bone envolvi la tuton. Loku la muldilon 30 minutojn en kongelujon kaj poste 4 horojn en la fridujon.

Kvara etapo

Elpremu la oranĝojn. Kribru la sukron, elverŝu ĝin en kaserolon. Aldonu la oranĝan likvoron, la sukeron kaj la maizan farunon diluitan en 2 supkuleraj da akvo. Densigu sur malforta fajro kirlante per ligna kulero. Eltiru la saŭcon el la fajro. Lastmomente, tranĉu la semifreddo-n en pecojn. Prezentu sur individuaj teleroj tegitaj per la oranĝa saŭco. Dekoraciu per rubandetoj da ĉokolado kaj ŝelppecetoj. Servu ĝin freŝa.

Mia semifreddo

Mi preparas ĝin sen likvoro, sed mi aldonas pli da oranĝsuko, iomete sukera kaj ne aldonas farunon de maizo.

Tiun recepton proponis Jeannine kaj Gérard.

